

ESPERANTOLEHTI

Esperanta Finnlando

Esperantobladet

Kesäkuu ♦ Junio

3/2000

Bonan someron al ĉiu leganto!



KEF tulee, oletko valmis? Ilmoittaudu! s. 5-7

Ĉu Esperanto-agado pezas iam kaj tiam? p. 4

Esperantolehti

Esperanta Finnlando ♦ Esperantobladet

ISSN: 0787-8206

Kielipoliittinen aikakauslehti. Suomen esperantoliitto ry:n äänenkannattaja.

Språkpolitisk tidskrift. Organ för Finlands Esperantoförbund.

Lingvopolitika periodaĵo. Organo de Esperanto-Asocio de Finnlando.

Perustettu/Grundad/Fondita 1918. Esperantolehti ekde/från 1989 lähtien.

Esperanta Finnlando 1918-23, 1948-53, 1959-1987.

Ilmestyy kuusi kertaa vuodessa. Utkommer sex gånger i året. Aperas sesfoje jare.

Toimitus/Redaktion/Redaktejo: (*väliaikainen/provizora*)

Jukka Laaksonen, osoite ja puh. alla/ adreso kaj tel. sube ✉ laakju@koti.tpo.fi

Taitto/Layout/Enpaĝigo: *Ilkka Santtila*

Tollinpolku 1 B 21, 00410 Helsinki. ☎ (09) 530 1804 ✉ ilkka.santtila@esperanto.fi

Tilauhinta/Prenumerationspris/Abonprezo: 80 mk/vuosi/år/jaro;

Jäsenille/ För medlemmar/ Por membroj: 60 mk; Baltio 60 mk, aliaj landoj 80 mk.

Tilaukset, osoitteenmuutokset/Abonoj, adresŝanĝoj:

Suomen Esperantoliitto, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki. ☎ (09) 715 538

Prenumerationer, adressförändringar: EAF, Broholmmsgatan 15 C 65, 00530 Helsingfors.

Postisiirtotili/Postgirokonto/Poŝtĝirkonto: 800017-230825.

Julkaisija/utgivare/eldonanto: Suomen Esperantoliitto – Esperanto-Asocio de Finnlando.

Painosmäärä/Eldonkvanto: 400

Esperanto-Asocio de Finnlando ♦ Suomen Esperantoliitto

Fondita/Perustettu/Grundad: 1907

Prezidanto/Puheenjohtaja: *Jukka Laaksonen*

Uudenkylänkuja 2 B 11, 33530 Tampere. ☎ (03) 255 4724; (050) 5829 248; työ/laboro: (03) 249 3313

Vicprezidanto/Varapuheenjohtaja: *Seija Kettunen*

Keihäsmiehenkatu 3, 40630 Jyväskylä. ☎ (014) 254 609 ✉ kari.kettunen@pp1.inet.fi

Sekretario/Sihtööri: *Päivi Saarinen*

Ruorimiehenkatu 5 C 23, 02320 Espoo. ☎ (09) 813 3217 ✉ paivi.saarinen@iki.fi

Aliaj estraranoj / Hallituksen muut jäsenet:

Tiina Oittinen, Puutarhakatu 26 A 11, 20100 Turku. ☎ (02) 230 5319 ✉ tiina.oittinen@pp.inet.fi

Aimo Rantanen, Haapalammentie 13 as 6, 40800 Vaajakoski. ☎ (014) 261 438 ✉ esperantolehti@esperanto.fi

Anna Ritämäki, Dragsfjärdsvägen 690, 25700 Kimito. ☎ (02) 423 146 ☎ (02) 423 246 ✉ aritamak@ra.abo.fi

Ritva Sabelli, Pietarinkatu 10 D 27, 00140 Helsinki. ☎ (09) 635 902 ✉ ritva.sabelli@sfs.fi

Vicestraranoj/Varajäsenet:

Jussi Jäntti, Huuhankatu 14 B 8, 70600 Kuopio. ☎ (0400) 859 641

Markku Saastamoinen, Siukolantie 9 H 12, 33470 Ylöjärvi. ☎ (03) 348 4245 ✉ markku.saastamoinen@koti.tpo.fi

Aini Vääräniemi, Vääräjärventie 26 A, 93590 Vanhala. ☎ (040) 518 7242 ✉ aini.vaaraniemi@pp.inet.fi

Rahastonhoitaja/Kasisto: *Antti Mikkola*

Ruorimiehenkatu 5 C 23, 02320 Espoo. ☎ (09) 813 3217 ✉ antti.mikkola@orion.fi

Postisiirtotili/Poŝtĝirkonto: 800017-230825.

Toimisto/Officejo: Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki, avoinna tiistaisin klo 17-19.

☎ (09) 715 538 (puh.vastaaaja/automata respondilo). Malfermita: marde 17-19-a horo.

UEA:n pääedustaja / Ĉefdelegito de UEA: *Heta Kesälä*

Kalamiehenkuja 3 D 32, 04300 Tuusula. ☎ (09) 275 5528

Postisiirtotili/Poŝtĝirkonto: 800029-19438647 (maksut UEA:lle/ pagoj por UEA).

Internet: <http://www.esperanto.fi>

Somero en Finnlando

Dum somero Finnlando estas fermita. Tiel oni ofte diras – kaj pravas, sed nur unuflanke. La fermita lando celas signifi, ke homoj ne laboras kaj diversaj servogiĉetoj estas fermitaj. Ankaŭ tio estas nur unu flanko de la monero. Kiom da homoj ne povas havi ferion kaj kiom da homoj ne ĝuste dum la somero? Hodiaŭ la kvanto de homoj laborantaj en industrio kaj konstruado estas multe pli malgranda ol antaŭe kaj en aliaj fakoj oni devas labori almenaŭ iukvante dum la tuta jaro. Sed dum someraj semajnfinoj, aparte dum mezsomeraj festotagoj kaj en julio, la urboj povas ŝajni fermitaj. Tion spertis multaj eksterlandanoj venintaj al Finnlando. Ili povas miri la malplenan ĉefurbon, kies trankvilo dum Johano-tago povas esti eĉ traŭmokaŭza – almenaŭ por tiuj, kiuj venas el multmilionaj metropoloj.

Turisto certe miras, kiu povas esti la kaŭzo por tio, ke finnlandano, kiu ĉie kaj kiam ajn tamen atingas trankvilan kamparon aŭ vastan maron dum duonhoro, aparte dum somero volas fuĝi al primitiva kabana vivo. Sed preskaŭ ĉiuj urbanoj el ni ja estas tiaj de la unua aŭ maksimume dua generacio kaj ni ankoraŭ ne ŝajnas esti hejme en urbo.

Kontraŭe al la fermita lando diversaj someraj aranĝoj abundas tiel, ke neniu unuopa homo teorie povus partopreni ĉiujn el ili. Kaj tiuj aranĝoj ne estas bagatelaj: kelkaj tiras al si pli ol 100 000 homojn. Pli kaj pli tiuj aranĝoj okazas ankaŭ en urboj.

Somero estas somero kaj finnlandano jam lernis laŭ eksterlandaj modeloj sidi en ĉestrata ekstera bierejo aŭ pikniki sur parka herbejo kiam la temperaturo estas 14 gradoj kaj malvarmumi en mallongmanika kaj -pieduma vestaĵo nur pro la teoria sezono. Finnlandanoj estas ja profunde eltenemaj kaj malforte reagemaj. Oni ankaŭ ŝercas, ke neniam oni ne povas scii, dum kiu semajno okazos la somero en Finnlando. Kaj kvankam la temperaturo dum pli ol duonjaro restis sub aŭ ĉe nulo, tamen ĉiuprintempe oni trovas homojn, kiuj dum la unua varma tago plendas pro tio, ke estas terure varme.

Ĉiuokaze por ni finnlandanoj somero estas la plej atendata sezono. Kaj ĝi estu volonte tia.

Bonegan kaj refreŝigan someron al vi ĉiuj.

Jukka Laaksonen

ESPERANTOLEHTI

ilmestyy vuonna **2000**
aperas dum la jaro

Nro	Deadline/ limdato	Ilmestyy/ aperas
4	15.7	1.8
5	15.9	1.10
6	15.11	1.12

Avustajien toivotaan noudattavan edellä esitettyjä aikoja. La redakcio esperas, ke helpantoj atentu la datojn supre.

Ilmoitushinnat

Ulkopuoliset mainostajat:	Jäsenet:
1/1 sivu 600 mk	1/1 sivu 300 mk
½ sivua 400 mk	½ sivua 200 mk
1/4 sivua 250 mk	1/4 sivua 125 mk

Niaj ŝarĝitaj funkciuloj

Ĉu vi memoras fabelon pri la forta viro, kiu alvenas al riverbordo kaj tie trovas maljunulon, kiu petas lin porti lin trans la inundan riveron? La viro serveme surdorsigas la malpezan maljunulon, sed ju pli profunden ili vadas, des pli peza iĝas la ŝarĝo. En aliaj fabeloj la forta viro mem bezonas veturigadon trans la riveron kaj petas tion de la surborda remisto, sed kiam ili alproksimiĝas la transan bordon, la remisto saltas surteren kaj repuŝas la boaton en la torenton, devigante la pasaĝeron fariĝi remisto. En iuj aliaj fabeloj surdorse portata bela junulino ŝanĝiĝas en strangolantan demonon, aliffoje la surdorsa malpeza etulo ŝanĝiĝas en plenkreskan kaj pezan Kriston. Ĉiuokaze la laboro de la portanto fariĝas suferiga batalo kontraŭ la malpliigo de la propraj fortoj en la superhoma tasko.

Tiaj fabeloj abundas en la internacia fabelaro. Estus interese pristudi ilin kaj trovi la psikologiajn kialojn kaj simbolismon. La taskoj de la funkciuloj en la Esperanto-movado – kaj pli ĝenerale en ĉia organiza vivo – kutimas fariĝi ŝarĝoj, kies pliiĝantan pezon la longtempa funkciulo ne plu eltenas, kaj neniu volas liberigi lin. Io tia okazis al

la redaktoro de Esperantolehti. Tuj post la limdato de la materialo por la junia numero li telefonis al mi, ke li ne redaktos Esperantolehti.

En la Esperanto-movado ni dependas de niaj malmultaj kapabluloj, kiuj ofte senegoisme laboradas kaj respondecas pri siaj taskoj dum dekoj da jaroj. Multan financan rekompencan ni ne povas doni al ili, kaj laŭdojn kaj dankojn ni ne ofte donas. La nombron de eblaj novaj funkciuloj nuntempe malpliĝas ankaŭ la fakto, ke por preskaŭ ĉiu tasko estas nepre bezonata komputilo kaj bonaj scioj pri ties uzo. Se niaj funkciuloj laciĝas, ilin pli facile ol antaŭe vundas nia kritikado, kvankam ĝi estus bonintenca kaj ne senkiala. Dolorige la kritikitojn ekronĝas duboj pri propraj kapabloj kaj amero pro la nedankemo de ni la servatoj. Tamen eĉ ne pro tio la servatoj fariĝu tute nekritikemaj, ĉar ie inter la kritikado ja kaŝiĝas la semoj de plibonigado, evoluo kaj solvoj. Aŭ ĉu ni kredu la profetion de Simon Payne, kiu antaŭdiras, ke en 2045 ne plu estos esperantistoj?

Raita Pyhälä

Esperanton kielioppi suomalaisille

Tiivis esperanton rakenteen erittely, joka vertaa esperantoa suomeen ja muihinkin kieliin, ilmestyy kesäkuun alussa monisteena (112 s. A4). Teos on omakustanne eikä tavoittele voittoa. Hintaan 70 mk on lisättävä postikuluja 12 mk. Kieliopin voi saada vain tekijältä:

Matti Lahtinen, Syrjälänk. 6 B 61, 40700 Jyväskylä. S-posti: <matlah@sci.fi>. Joitakin yleisiä tietoja, sisällysluettelo ja sivuja on [www-osoitteessa](http://www.osoitteessa):
<<http://www.sci.fi/~matlah/kielioppi/>>.



Kultura Esperanto Festivalo

17-23.7.2000
en Helsinko

Unutaga karto por KEF kosta 200 markojn. Ĝi inkluzivas 3 manĝojn. Plentaga partopreno kosta post la 1-a de junio 1283 markojn. Por junuloj 1057 markojn. La partoprenkotizo inkluzivas manĝojn kaj tranoktadon en amasloĝejo.

Al la julia Kultura Esperanto Festivalo aliĝis ĝis majo jam pli ol 100 homoj el 20 landoj. La aliĝintoj apartenas al ĉiuj aĝgrupoj, inter ili estas same beboj kiel avoaĝaj partoprenontoj. KEF estas festivalo por ĉiuaĝaj homoj, kiujn interesas esperanta kulturo.

KEF 2000 havas tre abundan programon. Certe estas io por ĉiaj gustoj. Estos en KEF vere riĉa literatura programo kaj multaj diversaj koncertoj. Vi povas ankaŭ sperti premierojn de tri tute novaj teatraj grupoj. Konstatu mem la abundon en la apuda programa horarskizo.

Aliĝilon vi trovas en la numero 1/2000 de Esperantolehti, en la retadreso www.esperanto.fi/kef2000.html.

[esperanto.fi/kef2000.html](http://www.esperanto.fi/kef2000.html) aŭ vi povas ĝin peti en la oficejo Siltasaarencatu. Ankoraŭ eblas aliĝi!

Ne maltrafu ĉi tiun unikan aranĝon. Venu kaj konatiĝu pli kun originale esperanta kulturo. Vi estos kore bonvena!

Kulture riĉan someron deziras al vi,

*Riitta Hämäläinen
kaj la KEF2000-teamo*

Ps. KEF-teamo plej kore dankas tiujn personojn, kiuj subtenis KEF-projekton finance. Kun granda dankemo akceptas subtenon al KEF-konto Merita 101130-220698.

Esperanto-festaroj

Esperanto-festareille on ilmoittautunut jo runsaat 100 osallistujaa 20 maasta, kaikista ikäryhmistä, vauvasta vaariin.

KEF on ainutlaatuinen tapahtuma, jossa voit tutustua alkuperäiseen esperantokulttuuriin ja viettää samalla viikon todella kansainvälisessä ja mielenkiintoisessa seurassa. Oh-

jelmatarjonta on runsas ja monipuolinen. Jokaiseen makuun löytyy varmasti jotakin, myös aloittelijan kielitaidolla. Tervetuloa mukaan!

Lisätietoja saat Siltasaarencadun toimistosta tai osoitteesta www.esperanto.fi/kef2000.html.



LUNDO 17.7

12.30 – 14.00

Lunĉo

14.00 – 15.30

Malfermo

15.30 – 17.00

Malfermo de komiksa ekspozicio (Torras/
Camacho)

Finnlando sin prezentas (Kauppinen)

17.00 – 18.30

Prelego pri la ibera skolo kiel fenomeno (Valén)

Kurso pri komiksdesegnado (Torras)

18.30 – 20.00

Vespermanĝo

20.00 – 21.30

Kantemula rondo (Karkiainen/Henriksen)

Prelego pri esperanta sciencfikcio (Dek/Camacho)

21.30 – 23.00

Akustika koncerto de Persone

23.00 – 3.00

Diskejo/Nokta Trinkejo

MARDO 18.7

8.00 - 9.30

Matenmanĝo

9.30 – 11.00

Verkateliero: Kiel verki infanrakonton (Neves)

Prelego pri historio de espomuziko 1 (Martorell)

11.00 – 12.30

Aktoremula rondo (Trifonchovski)

Aŭtora horo de Jorge Camacho

Koncerteto por infanoj (Karkiainen, Ĵomart kaj
Nataŝa, Miguel Gutiérrez)

12.30 – 14.00

Lunĉo

14.00 – 15.30

Aktoremula rondo (Trifonchovski)

Kio, diable, estas poezio 1? (Neves)

15.30 – 17.00

Kritiki: Ĉu anatemi aŭ ameni? (Neves)

Verkateliero: Poemo (Camacho)

17.00 – 18.30

Kantemula rondo (Karkiainen/ Henriksen)

Aŭtora horo de Liven Dek

Filmoprezento

18.30 – 20.00

Vespermanĝo

20.00 – 21.30

Vespero de esperanta ampoemo (Fernández ktp.)

21.30 – 22.30

Koncerto de Ĵomart kaj Nataŝa

23.00 – 24.00

Koncerto de Stomakoj

24.00 – 3.00

Diskejo/Nokta Trinkejo

MERKREDO 19.7

8.00 – 9.30

Matenmanĝo

9.30 – 11.00

Aktoremula rondo (Trifonchovski)

Finna saunxo (Hämäläinen)

11.00 – 12.30

Historio de espomuziko 2 (Martorell)

Verkateliero: Rakonto (Dek)

12.30 – 14.00

Lunĉo

14.00 – 15.30

Salsokurso (Henriksen)

Kio diable estas poezio 2? (Neves)

Filmoprezento

15.30 – 17.00

Komiksdesegnado (Torras)

Aŭtora horo de Miguel Fernández

17.00 – 18.30

Subĉielaj koncertoj sur scenejo Espan lava

18.30 – 20.00

Subĉielaj koncertoj sur scenejo Espan lava ĝis
20.30

20.00 – 21.30

Vespermanĝo

21.30 – 23.00

Teatra vespero : Ibere libere kaj Variantoj

23.00 – 3.00

Diskejo/Nokta Trinkejo

ĴAŬDO 20.7

8.00 - 9.30

Matenmanĝo

9.30 – 11.00

Aktoremula rondo (Trifonchovski)

Prelego pri verkisto Karolo Piĉ (Neves/
Fernández)

11.00 – 12.30

Verkateliero: Poemo (Camacho)

12.30 – 14.00

Lunĉo

14.00 – 15.30

Ekveturo al saŭnoekskurso/Kiljavanranta

15.30 – 17.00

Saŭno (Kantoj)

17.00 – 18.30Saŭno (Aŭtoraj horoj de Anja Karkiainen kaj
Sabira Ståhlberg)**18.30 – 20.00**

Saŭno kaj reveturo

20.00 – 21.30

Vespermanĝo

21.30 – 23.00Dancospektaklo "Hundoj diras vaŭ, vaŭ, vaŭ"
(Henriksen)**23.00 – 0.30**

Espoteko kun koncerto de Dolcxamar (Martorell)

0.30 – 3.00

Espoteko

VENDREDO 21.7**8.00 - 9.30**

Matenmanĝo

9.30 – 11.00

Historio de esperanta teatro (Trifonĉovski)

Verkataliero: Infanrakontoj (Neves)

11.00 – 12.30

Komiksdesegnado (Torras)

Aŭtora horo de Antonio Valén

Teatraĵo por infanoj

12.30 – 14.00

Lunĉo

14.00 – 15.30

Aktoremula rondo (Trifonĉovski)

Prelego pri esperanta rokliriko (Camacho)

15.30 – 17.00

Koncerto de Ĵomart kaj Nataŝa

Tri nuntempaj poetoj: De Neves al Zifu – ĉu vervi
aŭ Nervi? (Fernández)**17.00 – 18.30**

Verkataliero: Rakonto (Dek)

Beletra diskutejo: Postmilitaj poemoj de Kalocsay
(Valén)**18.30 – 20.00**

Vespermanĝo

20.00 – 21.30

Teatra prezento: Suninfanoj

21.30 – 24.00

Koncertoj de Juhani Haavisto kaj Persone roke

24.00 – 3.00

Diskejo/Nokta Trinkejo

SABATO 22.7**8.00 - 9.30**

Matenmanĝo

9.00 – 13.00Seminario: 20 jarojn post Raŭmo: Ĉu ni diras ion
kulture originalan kaj internacie valoran?

(Lindstedt ktp.)

Ekskurso al Suomenlinna ekde la 9-a

12.30 – 14.00

Lunĉo

14.00 – 15.30

Kantorondo (Karkiainen/Henriksen)

Aŭtora horo de Gonçalo Neves

Filmoprezento

15.30 – 17.00

Salsokurso (Henriksen)

Debato pri literaturaj vortoj (Lindstedt/Camacho)

17.00 – 18.30

Muzikpoema spektaklo: García Lorca (Fernández)

18.30 – 20.00

Vespermanĝo

20.00 – 22.00

Vespero de Talentoj

22.00 – 23.30

Esperanto Desperado

23.30 – 3.00

Diskejo/Nokta Trinkejo

DIMANĈO 23.7**8.00 - 9.30**

Matenmanĝo

9.30 – 11.00

Nordiaj esperantoverkistoj (Camacho)

Beletra diskutejo: Malfidelo surbaze de *Ekstretoj*
(Valén)**11.00 – 12.30**

Aktoremula rondo (Trifonĉovski)

Konversacio: Ĉu ekzistas esperanta folkloro?
(Camacho)**12.30 – 14.00**

Lunĉo

14.00 – 16.00

Fermo (Amatora teatro prezentas + adiaŭa koncerto)

Per Pasporta Servo en Lyon

En aprilo 2000 mia edzo kaj mi iom rondvojaĝadis en Francio. Ni bezonis tranoktejon en Liono, ĉar tie ni ne havas leteramikon. Anstataŭ rezervi ĉambron en hotelo ni decidis kontakti lionajn esperantistojn tra Pasporta Servo. Post nelonga atendado ni ricevis favoran respondon kun konsiloj pri la metroo kaj la urbo. Iom nin timigis la ideo, sed post kelkaj pli malpli sukcesaj telefonkontaktoj kaj trajnaj malfruetoj ni tamen sukcesis renkonti nian gastigontinon en liona metrostacio. Verdire ŜI trovis nin. Ni nomu ŝin Anna, ŝanĝita nomo.



Ni tre aprezis la afablecon de Anna, kiu venis renkonte al ni malgraŭ nia necerta horaro kaj ŝia okupiteco. Ŝi helpis nin aĉeti biletojn el la aŭtomato, ŝi montris kiel stampi la biletojn kaj kiun trajnon eniri, samtempe amike parolante en flua Esperanto, kvazaŭ ni konus unu la alian de longa tempo. Ĉiel ŝi lasis nin kompreni, ke ni estas bonvenaj kaj ke ŝi deziras, ke nia halto en Liono estu sukcesa kaj agrabla.

Anna loĝas en antaŭurbo, en nova luma apartamento. Ni rajtis okupi ŝian salonon. Ŝi estis jam pretiginta liton por ni sur la sofo. Tra la fenestro ni vidis duoncirklan balkonon kaj duonsovaĝan verdan herbejon, nekutimaĵoj en malnovaj francaj urboj. Post

ioma ripozo kaj konatiĝo kun ŝia edzo ni ĉiuj reveturis al la centro, ĉar Anna devis partopreni kunsidon en K.T.P., kiu estas internacia, multkultura kafejo kaj kunvenejo, uzata ankaŭ de esperantistoj. Enirinte la kafejon tra mallarĝa malluma koridoro ni surpriziĝis pro la unika etoso. Estis kvazaŭ ni enirus iun ekzotikan, indiĝenan vilaĝon, ĉar sur la muroj pendis ornamaj bildtapiŝoj pri ne-eŭropaj kulturoj kaj belaj lignaj traboj markis la randojn de enkafejaj balkonoj kaj interspacoj.

La edzo de Anna rolis kiel ĉiĉerono kaj montris al ni la malnovan kernon de Liono, kie antaŭe prosperis silkindustrio, sed nun la ejoj estas uzataj de alternativuloj, multegaj restoracioj (turka, juda, meksikia, usona k.a.), amuzejoj, noktoklubo kaj similaj. Ni vidis ankaŭ belajn preĝejojn sed eniris nur unu. Ni grimpis sur monto, de sur kiu ni vidis la urbegon etendiĝi ĝis la griza foro. Pluvetis aŭ pluvegis, la junaj folioj de la arboj en la parkoj bonodoris. La pluvo briligis la kolorojn de la malnovaj pavimoj. Malgraŭ la malseka vetero estis ĝojo vidi almenaŭ parton de Liono.

Post la 20a horo ni kun kvar aliaj geesperantistoj serĉis restoracion por niaj vespermanĝo kaj interparolado. En Liono troveblas malnovaj malgrandaj restoracietoj "bouchon", kies kuirrejo situas en la



sama ĉambro kiel la manĝejo. Ĉu nia restoracio estis "bouchon" aŭ ne, mi ne certas, sed la menuo al ni ŝajnis tre franca kaj enhavis komencan kaj ĉefan pladojn kaj deserton, ĉiuj bongustaj kaj tradicie dikigaj. Niaj samtabloj amike klarigis, kion vere signifis la pladonomoj, per kreto skribitaj sur nigra tabuleto. Ili ankaŭ rakontis pri lionaj Esperanto-vivo kaj manĝokulturo. La etoso estis unika, almenaŭ al ni finnoj. Volonte ni aldonis al la pagenda sumo iom da subteno al la agado de K.T.P. Ja ni ne tial uzis Pasporta Servon, ke ni dezirus plej eble malmultekoste tranokti, sed ĉar ni deziris sperti lionan etoson kun tieaj esperantistoj.

Post la 22a ni ankoraŭ piediris por vidi altan domegon, kies du muroj estis lerte pentritaj tiel, ke ŝajnis kvazaŭ sur la balkonoj kaj ĉe la pordoj kaj fenestroj starus aŭ sidus homoj vestitaj laŭ la modoj de la pasintaj jarcentoj. Ili prezentis famajn francojn, ekz. la verkiston Saint-Exupéry aŭ la fratojn Lumière. Ĉio tio ŝajnis tiom reala, ke mi unue pensis, ke temas pri aktoroj, sed ĉio estis nur ŝajno, eĉ la balkonoj, pordoj, fenestroj kaj tegmento. Ĝenia maniero konigi historion, plibeligi tedan muregon, surprizi preterpasantojn kaj allogi turistojn! La konstruaĵo mem enhavas normalajn apartamentojn, diris niaj ĉiĉeronoj.

Frumatene, post tasego da laktokafo, ni kun Anna ree eniris la metroon. Ŝi konsilis nin pri ĉio, aĉetis la biletojn per niaj moneroj, desegnis mapeton por montri, kiel ni trovos la aŭtobuson al la flughaveno. Ĉio iris glate, danke al geesperantistoj, kiuj faras sian eblon por Pasporta Servo. Mia edzo kaj mi nun opinias, ke indas uzi la Servon. Espereble ni povos reviziti Lionon kaj tie pasigi plurajn tagojn por pli bone konatiĝi kun la regiono.

R.P.

Fraŭloj lipharaj

(Vanhojapoikia viiksekkäitä)

*Sur insulo en Saimaa loĝloko,
sidas Nestori Miikkulainen sur ŝtupar',
ludas buŝharmonikon, kaj foko
surŝtonigas sin el la ondar'.*

*Sub la akvo naĝadis ĝi al la ludant'.
Tre konata al ĝi estas ja lia kant',
kie sonas soleca sopir' kiel tem'.
Ĝi aŭskultas kun komprenem'.*

*Ne povis Nestori festi la nupton,
ĉar fianĉin' foras pro monda log'.
Fraŭloj lipharaj – spitantaj volupton –
estas do ambaŭ, viro kaj fok'.*

*Sur insulo en Saimaa loĝloko,
tien veni rifuzis la vivkunulin'.
Solas Nestori samkiel foko,
mankas ankaŭ fokin' pro destin'.
Granda estas lag' Saimaa, sed fokoj nur cent
post nelonge formortos verŝajne la gent'.
La sopiro ludata per buŝharmonik'
kompreniĝas do sen eksplik'.*

Ne povis Nestori ...

*Sur insulo en Saimaa loĝloko,
sidas Nestori Miikkulainen sur ŝtupar',
Sur la ŝtono rigardas la foko
kunsenteme al kara najbar'.
Granda estas lag' Saimaa, sed inojn nur nul
de sur bordoj allogas la venta insul'.
Devos resti kaj Nestori kaj foko ĉi,
la lastuloj de l' famili'.*

Ne povis Nestori ...

*Muziko kaj teksto: Juha Vainio
Traduko: Anja Karkiainen*

Mervyn Claxton: Kulturo kaj sano

Tradukis Helga Rapley, eldonis UEA 1999, 42 paĝoj

Post la libroj *Kulturo kaj evoluo* kaj *Kulturo kaj teknologio* aperis nun en la serio de UNESKO-libroj studaĵo pri la rilato inter kulturo kaj sano. Mervyn Claxton ankaŭ ĉi-foje provas multon pritrakti per malmultaj paĝoj. La libro estas samtempa atako al la moderna pilola medicina industrio, pledo por ekuzo de tradiciaj popolaj medicinoj kaj klarigo de la kultura medicina historio. Plej bone sukcesas la lasta parto: Tra konkretaj ekzemploj ni konatiĝas kun diversaj konceptoj pri sano kaj malsano, lernas pri tradiciaj sanigaj sistemoj kaj sekvas la evoluon de la moderna medicino. Ni ekscias pri la batalo kontraŭ malario, variolo kaj aliaj malsanoj, pri diversaj tradiciaj sanigaj sistemoj, kaj pri la rilato al sklavigaj drogoj (narkotaĵoj). Ĉie preskaŭ troas interesaj koncizaj informoj, kiujn ordinara leganto ne povas kontroli, nur fidi aŭ ne fidi.

Tra la historio ekestis diversaj konceptoj pri sano kaj malsano. Iom post iom la tradiciajn kuracmetodojn forpuŝis la moderna scienca medicino. Tuthoman pritrakton, kie oni ne distingis inter menso kaj korpo, anstataŭis pli specifa serĉado de malsano kun difinita kuracilo. Laŭ Claxton tiu evoluo iris tro longe, kaj ni nun pro evidentaj limigoj en la moderna medicina prizorgado, devas ree atenti la tradiciajn formojn de sanprizorgo.

Estas facile konsenti kun Claxton, ke ni vivas en drogo-kulturo, kie ni provas kuraci ĉiun malsanon per piloloj. Li pravas ke la medicina industrio estas potenca monmaŝino, kaj ke multe pli gravas vivstilaj fakto-

roj ol nuraj pilolaj sanigiloj. Li referencas al la Monda Sanraporto, kiu konstatas ke vivstil-rilataj malsanoj kaj statoj kulpas pri 70-80% de mortoj en evoluantaj landoj kaj pri ĉ. 40% en la evoluanta mondo. Per pli bona dieto, malstresigo, pli da ekzercado kaj malpli da fumado, ni savus pli da vivoj ol per ĉiaj ajn medikamentoj en nia mondo-parto, kaj sekurigante bazajn higienajn kaj nutrajn kondiĉojn multegaj vivoj estus savitaj en "La Sudo".

Sed en sia pledo por "tuthoma pritraktado", Claxton ne estas tute fidinda. Kial? Unue, ĉar li tute pretervidas, ke ankaŭ tiu alternativa medicino estas grandega industrio, en kiu ĉiaspecaj ĉarlatanoj proponas al malsanuloj ĉiajn medikamentojn tute netestitajn sub belaj sloganoj pri "tuthomeco", "ekvilibro", "energio" kaj aliaj modaj esprimoj. Malgraŭ ĉio, avantaĝo pri la "okcidenta" medicino estas la postuloj pri pruvita efiko antaŭ ol disvendigi ĝin. Tio mankas inter la alternativa medicino, kaj plej efikaj kaj bonvenaj kuraciloj ekzistas flank' al flanke kun pura trompaĵo.

Multas ekzemploj pri tio, ke indiĝenaj popoloj unu de la alia izolitaj evoluigis sam-specajn procedurojn kaj kuracilojn por la sama malsano. Tio ja estas signo, ke vere efikas la kuracado. Aliflanke, oni ĉiam trovas ekzemplojn, kiuj fortigas sian propran hipotezon. Kiom da ekzemploj troveblas, kie tute ne kongruas la manieroj, kaj kie neniel estas montrita logika sekvo inter la sanigada maniero kaj la atingita sanstato?

Norvegio estas menciita kiel pozitiva escepto rilate la senrezervan pilol-kulton. Kiam aliaj eŭropaj landoj havas pr. 20 000 registritajn preparatojn, Norvegio sekurigas la popolan sanon per ne multe pli ol mil. Fakte, tiu cifero apartenas al la historio. Ĝis antaŭ nelonge validis la paragrafo pri neceso, laŭ kiuj novaj kuraciloj estis akceptitaj nur, se la prisanaĵaj aŭtoritatoj sentis bezonon je ili. Nun, ĉiu medikamento aprobita en EU principe estas vendebla ankaŭ en Norvegio. Tio ne signifas ke la landon inundos novaj tablojdoj kaj piloloj. Grandega parto de tiuj kuraciloj havas saman efikon (paralelaj medikamentoj), kaj ne certas ke ĉiuj kompanioj vidos allogan merkaton en Norvegio.

Ofte la tuto estas pli ol siaj komponentoj, t.e. ke izolitaj substancoj ekstraktitaj de plantoj ne havas same bonan efikon kiel la planto mem. Ne maloftas ke aktivaj substancoj devas efiki kune por entute efiki. Tio estas konata fenomeno, kaj ne iu novaĵo kiu skuas la medicinan sciencon. Strange aspektas la eldiro ke ”se oni konsultus tradiciajn praktikantojn anstataŭ bazi la esploron nur sur hazarda kribrado, malkovrado de farmakologie aktivaj ingrediencoj pliiĝus de multe malpli ol unu procento ĝis kvardek procentoj” (p. 27). Ĝuste tion oni ja jam faris, kaj multaj kuraciloj estas trovataj ĝuste tiu-maniere, ekz. de digitalo.

”Valortaksoj pri medicina komplementa kaj alternativa montris, ke ĝi estas almenaŭ same sukcesa kiel konvencia medicino el la mallonge-daŭra kuraco de la sanstatoj kiujn ĝi kutime pritraktas. La malmultaj studoj

faritaj pri longedaŭra kuraco de tiaj statoj kutime montras komplementan medicinon pli sukcesa ol la moderna” (p. 35). Estas referencita artikolo el *Unesco Courier*. Mi treege ŝatus scii pri tiaj eksperimentoj. Ĝenerale dirindas, ke estas tre malfacila afero taksu medicinan efikon, des pli tiom ĝenerale kiel en la supra citaĵo. Same kiel eksperimentoj pri esperantolernado, tiuj pri alternativa medicino ofte ne plenumas sciencajn postulojn necesajn por poste povi kontroli la rezultojn.

Komence mi menciis la medicinan historion. Abundas interesaj informoj. Kion vi scias pri kirurgio en la antikva Egiptio, pri ĉinaj medicinaj enciklopedioj, pri la religia influo al higieno (ni kristanoj plurajn jarcentojn fieris pri nia malpureco!), pri afrikaj tradiciaj kuraciloj aŭ la saniga efiko de kanabo kaj opio? En 1854 norma angla lernolibro pri medicino asertis, ke opio estas “sendube la plej grava kaj valora rimedo en la tuta *materia medica* uzenda kontraŭ ĉiutagaj malsanoj”!

Evidente necesas reprintsado de la prisanaĵaj servoj, kaj en la riĉa kaj en la malriĉa partoj de la mondo. Tiu ĉi libro bonvene instigas al tiu diskuto. Legu ĝin sciavide, sed memoru ke estas diferenco inter havi menson malfermitan kaj truon en la kapo.

Bård Hekland

(el Norvega Esperantisto 2/2000)

JOS + (...ISI..) = SE + (...US)

Jos minä olisin sinä, niin kysyisin, mitä tuo merkitsee. *Se mi estus vi, mi demandus, kion tio signifas.*

Noista kahdesta virkkeestä löydät kyllä otsikkona olevan kaavan, joka kertoo, että konditionaalinen tuntee suomessa ISI-tunnuksesta ja esperantossa US-päätteestä. Usein konditionaalilla ilmaistaan asioita, jotka toteutuisivat, jos jokin olisi toisin. Konditionaalilla käy päinsä myös kohtelias pyytämisen ja mahdottomien toiveiden ilmaiseminen.

Ho, se mi estus birdo! Olisinpa lintu! Ho, se ni nur havus tempon! Olisipa meillä aikaa! Mi legus ĉion, se mi havus tempon. Lukisin kaiken, jos olisi aikaa. *Ĉu vi povus konsili min? Voisit(te)ko neuvoa minua?*

Joskus tarvitsisi erilaista konditionaalista ohimenneitten tilanteitten kuvaukseen.

Olisipa minulla ollut aikaa! *Se mi nur estus havinta tempon!* Olisin lukenut kaiken. *Mi estus leginta ĉion.*

Tähän menneen ajan ESTUS ...INTA-osaan tulee monikossa päätte J:

Ho, se ni nur estus sciintaj tion! Olisimmepa tietäneet sen!

Jotkut yksinkertaistavat konditionaalista käyttöä niin, etteivät ollenkaan käytä ESTUS ...INTA(J) -muotoja, vaan luottavat siihen, että asiayhteydestä selviää, onko kyseessä nykyisyys, esim ”lukisin”, vai menneisyys, esim. ”olisin lukenut”, kun esperantoksi on molemmilla kerroilla ”*mi legus*”. Varsinkin alkeiskursseilla ja puhekielessä tehdään näin. Pitempää menneen ajan muotoa ”*estus leginta(j)*” kuulee harvemmin. Se tulee vastaan jatkokursseilla ja kirjakielessä.

Koska esperanto kuitenkin pyrkii lyhyteen ja koska monet esperantistit katsovat oikeudekseen keksiä omia ratkaisuja, niin menneitä tapauksia varten on kehittynyt uudisilmaus, jonka tunnuksena on ...INTUS. Siinä on ikään kuin vedetty yhteen osat ESTUS ...INTA, tai voisi ajatella, että siinä on yhdistetty menneen ajan aktiivin partisiipin tunnus INT ja konditionaalinen tunnus US. Tällä yhdistämisellä ei kuitenkaan (vielä?) ole virallista hyväksyntää eikä sitä ole kieliopeissa, mutta voit käyttää sitä, jos se sinusta on hyvä.

Ni legintus, se ni havintus tempon. Olisimme lukeneet, jos olisi ollut aikaa.

Li komprenintus, se vi klarigintus. Hän olisi ymmärtänyt, jos olisit(te) selittänyt (selittäneet).

Perinteellisellä Zamenhofin kielellä sanottaisiin *Li estus kompreninta, se vi estus klariginta(j)*.

Ja krumeluurit päälle!

Kieliopeja selatessani löysin tällaistaikin konditionaalista käyttöä: *Dio ne estas homo, ke li mensogus.* Ei Jumala ole ihminen, niin että hän valehtelisi. *La vetero estas tro aĉa, por ke ni promenus.* Ilma on niin kurja, että emme voi mennä ulos. *La patro frapis sur la pordo, kvazaŭ li estus fremdulo.* Isä koputti, ikään kuin hän olisi vieras. *Ili fermis la pordon, antaŭ ol mi estus povinta eniri.* He sulkivat oven nenäni edestä (ennen kuin ehdin/voin mennä sisään). *Li prelegas, sen ke oni interrompus lin.* Hänen luentojaan ei keskeytellä välikysymyksillä.

Näistä ”krumeluureista” kai vain kolmas (*kvazaŭ*) tuntuu suomalaisesta tarpeelliselta.

Saliko

INFORMA BAZARO

Diversaj lingvoj de poezio en la kulturcentro Caisa/Helsinki – inter ili Esperanto

La 26-an de aprilo okazis en Helsinki la aranĝo "Kirjan ja ruusun päivä", tago de libro kaj rozo. Plurloke en la urbo oni povis ĝui beletrajn prezentojn. En la internacia kulturcentro Caisa, estonta KEF-ejo, okazis samkadre aranĝo, kiu nomiĝis "Runon eri kiel", diversaj lingvoj de poezio.

Sur la podio alterne staris diverslandaj verkistoj, ĉiu prezentis proprajn verkojn en la gepatra lingvo. La aŭtoroj venis el Makedonio, Somalio, Afganistano, Turkio, Irako, Peruo, Estonio, Bulgario, Hispanio... kaj el Esperantio. Esperantan poezion, esperante evidente, reprezentis Anja Karkiainen.

Anja komencis per poemo "Mankas krotaloj" de William Auld kaj rakontis ĝenerale pri esperantlingva verkado kaj beletro. Ŝi prezentis plurajn proprajn poemojn, jen kalevala-ritman poemon pri elmigranto Väinämöinen en Esperantolando, jen poemon

pri anima proksimo kaj amikeco, jen amuzan limerikon pri sinjoro kaj linko sur la strato Mannerheimintie por trideko da homoj – inter ili nur du esperantistoj. Anja stelulis en Caisa ankaŭ kante. Ŝi prezentis sian originale esperantan, popolkantecan "Kvarfoliaj trifolioj".

Fascinis kaj mirigis la publikon, ke iu verkas en sia ne gepatra lingvo. La esperanta parto de Anja kaptis multan atenton kaj demandojn.

Laŭ Anja la evento estis multflanka kaj interesa, la etoso varma kaj kuraĝiga. Malgraŭ lingva abundo, la publiko aŭskultis tre kompreneme. Anja ankaŭ ĝojis pro bona oportuno spertiĝi en prezentado.

Kaj imagu: La iniciato por prezenti esperantan poezion en Caisa venis de la kulturcentro mem!

RH

Lernu la polan en Pollando per Esperanto!

La renoma Somera Lernejo de la Polaj Lingvo kaj Kulturo funkcia en Jagiellona Universitato en Krakovo, unu el la plej malnovaj eŭropaj universitatoj, decidis akcepti somere 2000, inter siaj multegaj gestudentoj, grupo(j)n de esperantistoj.

Instruos E-instruistino en tiu universitato, Maria Majerczak, kiu lastatempe diplomiĝis ankaŭ pri instruado de la pola kiel fremdlingvo. Bonvolu peti informilon (german-, angla- aŭ pollingvan) ĉe:

Uniwersytet Jagielloński, Szkoła Letnia Kultury i Języka Polskiego, ul. Garbarska

7a, 31-131 Kraków. Tel. +48(12) 421-3692 fax +48(12) 422-7701, email: <plschoo@jetta.if.uj.edu.pl>.

Aŭ viziti la retpaĝon: <<http://www.if.uj.edu.pl/UJ/SL/>>.

Datoj: 3.07–23.07, 3.07–30.07, 3.07–13.08 aŭ 28.07–18.08.2000.

Lernado neintensiva (koncernas nur 4- kaj 6-semajnajn kursojn): 2-3 horoj tage; intensiva: 5-6 horoj tage, dum 5-6 tagoj semajne.

La grupo estos formita, se aliĝos minimume 8 partoprenantoj kun samaj preferoj. Por faciligi formiĝon de la grupo, bv. indiki, se

eble, pli ol unu akcepteblan por vi daton k.a. cirkonstancojn.

La lingvolernadon akompanos prelegoj de specialistoj pri polaj lingvo, kulturo (i.a. arto, literaturo, filmo), historio, ekonomio, sociaj aferoj, samkiel riĉa kultura kaj turisma programo.

Oni povos ricevi atestilon pri lingvolernado kaj studentoj de superaj lernejoj – post antaŭa interkonsento kun sia lernejo – kreditpoentojn.

Bonvolu nepre aldoni, ke vi estas esperantisto.

IJS 2000

Inter 27-a de julio kaj 2-a de aŭgusto 2000 okazos la 13-a Internacia Junulara Semajno (IJS) en la hungara urbo Nyíregyháza.

